

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 8/1985 ★ Kr 8,50

La Koboldo


de Viktor Rydberg

Regas vintromeza malvarm',
fajretas luma stelaro.
Ĉiu dormas en fora farm',
glimas neĝblanka arbaro.
Luno iras sur sia rond'
brilas sur neĝa doma mond',
ombrojn tegmentajn ĝi formas.
Nur koboldo ne dormas.

Staras li ĉe boveja pord'
griza etulo saĝa,
turnas sin lau' malnova ord'
al lunulo pli aĝa.
Rigardas arbaron de pin', abi'
donas muron al korto ĝi.
Cerbumas li pri vivproblem'
mankas solvo de tiu tem'.

Koboldo kaŝe je enir'
gemastrojn karajn vizitas,
pro longdaŭra gardo la eta vir'
ilian dankemon meritias.
Staras li fine apud lulil',
je kuŝas dolĉe filino kaj fil',
envias li ne la riĉon
sed ĝuas la doman feliĉon.

Regas vintromeza malvarm',
fajretas luma stelaro.
Ĉiu dormas en fora farm'
bone ĝis frua faro.
Luno subiras sur sia rond'
brilas sur neĝa doma mond'
ombrojn tegmentajn formas.
Nur koboldo ne dormas.



Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet
måndag-torsdag kl. 17-19.
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-
förbundet.

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 75 kr
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvintopinto. Om du inte får den, med-
dela födelseår till Esperanto Centro.

SEF:s styrelse

Ordförande: Karin Lindquist
tel. 0589-155 31

Sekreterare: Anita Lindblom
tel. 08-773 40 24

Kassör: Börje Andersson
tel. 0500-122 05

Märtha Andreasson, Åke Rohdin,
Kersin Rohdin, Birger Viggen

Suppleanter:

Ingemar Nordin, Bertil Andreasson

La Espero

Organ för Svenska
Esperantoförbundet.

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.
Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.

Redaktion:

Karin Lindquist (huvudansvarig)
Västermovägen 19, 732 00 Arboga
tel. 0589 - 155 31
Ulf Ribers, Norra Freberga,
591 90 Motala, tel. 0141-220 35.
Bertil Danielsson (layout)
Årjäng, tel. 0573-105 69.

Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1985

Manuskript sändes en månad före
utgivningsdatum till
Karin Lindquist (adress se ovan).

Esperantoförlaget

Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept.-15 maj:

onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras
hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

HODIAŬ

De la redakcio

La Espero 1985

Jaro rapide forpasas! En via mano
vi ĝuste nun havas la lastan nume-
ron de *La Espero* por 1985.

Ni dankas ĉiujn, kiuj iamaniere
kontribuis al la gazeto. Kiam mi
surprenis la redakcian postenon
mi kredis ke la plej granda pro-
blemo estis ricevi materialon al la
gazeto. Sed la problemo estas
kontraŭa - kiamaniere ricevi
lokon por ĉio. Mi tre ĝojas pro via
intereso riĉigi nian membrogaze-
ton per bona materialo.

Al la multaj kunhelpantoj, kiuj
tiel sperte kaj akurate pretigis la
gazeton, mi kaj certe ankaŭ la
legantoj kore dankas.



**Gör som vår fd ord-
förande i SEF - skaffa
20 "Esperantofrämja-
re"!**

La Espero 1986

Venontjare la *Espero* aperos ĉir-
kaŭ:

nr 1 31 januaro

nr 2 28 februaro invitilo kaj in-

formo pri la jarkongreso de SEF

nr 3 30 marto temanumero pri

paco

nr 4 30 aprilo

nr 5 15 junio raporto pri la

SEF-kongreso

nr 6 15 septembro raporto pri la

UEA-kongreso

nr 7 15 oktobro

nr 8 30 novembro

La materialo, korekte maŝins-
kribita, devas esti ĉe la redakcio
unu monaton antaŭ la eldonda-
toj.

Anoncoj

Vi ja scias ke ni volonte enmetas
anoncojn - en limigita kvanto.

La prezo estas:

1/1 paĝo	kr 1.200
1 1/2 paĝo	kr 725
1/4 paĝo	kr 425
2 kolonoj x 6 cm	250

Redaktoro

*La estraro de SEF kaj la redakcio
de La Espero deziras
al ĉiuj legantoj*

Bonan Kristnaskon

kaj

Feliĉan Novan Jaron

INNEHÅLL/ENHAVO

- 100 Kion vi faros komence de majo...?
Kalendaro Svedio
- 101 E-o en paca aranĝo en Göteborg
Peking, Kina
Abonu "El popola Ĉinio"
- 102 E-olitteratur på svenska
BIBLIOTEK 85
Traduku por la gazetaro!
- 103 Bokklubben Nova Libro
E-o kaj turismo
Dankon
- 104 SEJU Kultura E-o-festivalo - lägesrapport
IJK en Israelo
- 105 Tra la lando
- 106 ...tra la lando...
- 107 ...tra la lando.
Nekrologo
Alvoko por AIMAV-kolokvo 1987
Kiu povas helvi la germanan VISIR
- 108 Novaj fakaj asocioj
Individua membreco en UEA 6:50 guld.

Prezidanto:

Ĉu vi permesas:

La estraro kunsidis la 5-6a oktobro en Skövde kaj ni traktis multajn punktojn, Ĉisube kelkaj:

La ekonomia problemo okupis nin parte de la tempo. Ni diskutis diversajn eblecojn havigi monon. Ni iom post iom raportos la rezultojn. Ni kompreneble planis por la jarkongreso en Örebro 2-4 majo kaj ankaŭ komencis pensi pri la jubilea kongreso 10-13 majo 1987, kiu okazos en Stockholm.

Ni decidis esplori la eblecon aranĝi kunsidon en la Sveda Esperanto Instituto la 1-an de decembro en Stockholm. Nun kiam la statutoj estas aprobitaj de ĉiuj enmiksantaj organizoj mi esperas ke ni nun povas komenci kunlabori pli intensive.

La estraranoj pli celkonscie kontaktos internaciajn organizojn por diskuti kunlaboro kaj ni ankaŭ admonu klubojn kaj unuopajn esperantistojn fari sammaniere. krome ni decidis admoni klubojn kontakti Lions kaj Rotary por oferti informprelegojn pri esperanto.

Aliloke en la gazeto vi povas legi ke en Hispanujo estis inaŭgurite tri Esperanto-stratoj antaŭ ne longe. Ĉu ni povus atingi tiujn nombrojn en malpli ol du jaroj?

Ne forgesu skribi al: Generaldirektör Bertil Zackrisson, Postens Centralförvaltning, 105 00 Stockholm,

kaj proponi eldonon de poŝtmarko okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto 1987.

Ŝajnas ke ni postulas multe de la kluboj kaj ceteraj esperantistoj, sed la jubileo proksimiĝas rapide kaj ni ne estas duonvoje al nia ce-



lo - ĉiuj svedoj scias pri esperanto 1987. La estraro intensive laboras por pretigi la novan informmaterialon. Parte ĝi estas preta: dekaloj, glumarkoj... La cetera materialo en la "pakaĵo" estos post unu-du monatoj: afiŝoj, broŝuroj, lumbildoj kun prelego ktp. Tiun materialon ni ellaboris por faciligi vian informlaboron por esperanto.

Dankon por bona kunlaboro dum 1985 kaj sukceson en via laboro por esperanto dum 1986.

Karin Lindquist
prezidanto



Kion vi faros komence de majo 1986?

Unu sepcentjarulo atendas por bonveni esperantistojn dum la jarkunveno de SEF en 1986. Ĝia blua ĉapelo formiĝas de arbaraj regionoj de Kilsberget enhavanta amason da malnovaj minejoj, nur sole de historia valoro. Ĝiaj piedoj kuŝas en la akvo de Hjälmaren kun fiŝoj naĝantaj en ĝi kaj birdoj flugantaj apud la strandoj. Ĝiaj vejnoj pulsas de multa trafiko kru-canta ĝin en ĉiuj direktoj. Kaj ĝia stomako-kloako nomata Svartån dividas ĝin je la mezo farante la trafikokaoson pli sentebla sed ankaŭ la pitoreskajn ĉirkaŭ la koro mem – la malnova kastelo. – Siajn brakojn ĝi etendas suden kaj norden, okcidenten kaj orienten kvazaŭ por ĉirkaŭbraki vin kiuj venos por viziti ĝin dum la unuaj tagoj de majo. Ĝia nomo estas Örebro.

Historia urbo

En nordokcidento montoj, en sudoriento kamparoj – la loko farita de naturo mem por kolekti homojn pro interŝanĝo de varoj, spertoj, opinioj aŭ por ripozi dum longa vojaĝo. Historia restaĵo ankoraŭ vivas i.a. en la formo de granda dumvintra merkato Hindersmässan, kiu okazas dum tri tagoj dum la lasta semajno en januaro ĉiujare.

Estis praktike kolekti ĉitien parlamenton, opiniis jam Magnus Eriksson kaj rekonstruis mal-

novan fortikaĵon en Svartån al kastelo. Pluraj gravaj kunsidoj de eklezio kaj de parlamento okazis tie jam dum la tempo de Gustav Vasa kaj multaj gravaj decidoj tie ekĝermis kaj firmiĝis.

Estis ankaŭ opartune tranokti tie dum longaj diliĝancveturoj – eĉ se oni estis reĝo – kaj tiel faris Karlo la 9-a kelkajn fojojn dum 1580 kaj 1581. La kastelo estis tiam rekonstruata kaj kiel tranoktejo li uzis apudan lignan kabanon de post tiam nomata "Kungstugan". Ĝin oni ankoraŭ povas vidi en la subĉiela muzeo de Wadköping, nomo konata el romano pri familio Markurell de Hjalmar Bergman.

Pluraj famaj personoj el kultura vivo estas ligitaj al Örebro: de fratroj Olaus kaj Laurentius Petri, Lars Vivallius, ĝis niaj tagoj kiam ne malpli ol tri konataj radiovoĉoj venas de ĉitie. Unu el ili antaŭ nelonge por ĉiam silentiĝis: Torsten Ehrenmark, je ĉies bedaŭro.

Moderna urbo

Dum pli moderna tempo famiĝis arkitekturo de Örebro pere de de konata "Fungo", la 58m alta akvoturo de kie oni povas vidi la tutan urbon kaj la lagon – dum bela vetero. Kiam vi laciĝis de la vento blovanta sur la videjo, vi povas eniri agrablan kafejeton por ĝui hejmebakitajn kukojn kaj ion trinkeblan. La prezoj tute ne estas pli altaj ol sur la tero malsupre.

Dum la rondveturo tra la urbo via gvidantino, kluba sekretarino, Ann-Marie Forsgren promesas montri al vi ankaŭ la modernan,

ĵus finkonstruitan loĝkvartalon en la orienta parto de la urbo. En ĝia proksimeco estas ankaŭ Altlernejo kun ĝia parto por gimnastiko kaj sporto, kiun ankaŭ Ulrika Knape vizitadis siatempe.

En la alia flanko de la urbo oni povas admiri belan parkon kaj domegon kun apudaj konstruaĵoj de bienego Karlslund. La tuta bieno estas ordigita kiel muzeo. Oni trovas tie muelejon, elektrejon (unu el la unuaj en la lando), laktejon, ĉevalojn ktp. La ĉefa domo estas ordigita kiel konferencejo kaj kafejo samtempe ke oni tie montras diversajn ekspoziciojn.

Pri Örebro iu diris: "Se oni volus palpi la pulson de patrino Svea oni metu la manon super Örebro". Ne pro ĝia signifo, grandeco aŭ beleco, sed pro tio ke ĉiuj gravaj vojoj renkontiĝas ĉitie: vi povas veni tere, akve aŭ aere, per aviadilo, auto, trajno aŭ biciklo – kaj vi ĉiam estas bonvena.



Den arkitekturbistoriskt intressanta Nikolaiskolan i Örebro.

La jarkongreso de Sveda Esperanto Federacio okazos de la 2-a ĝis la 4-a de majo 1986 en Örebro. En februara numero de La Espero vi ricevos ĉiujn praktikajn informojn.

Kalendaro por Svedio 1986

Februaro	La semajno de amikeco
2-4 majo	La jarkongreso de SEF en Örebro
12-16 majo	Internacia kurso en Nordiska Folkhögskolan, Kungälv
17-19 majo	Kultura Esperanto Festivalo en Uppsala
7 septembro	La Dan-Sveda Tago en Danio
28 septembro	La Esperanto Tago en la tuta Svedio
4-5 oktobro	Nordia renkontiĝo en Bengtsfors



Esperanto en paca aranĝo en Göteborg

”Kune por pli bona mondo” estis aranĝo en Göteborg fine de oktobro, en kiu Esperanto ludis gravan rolon. La inicianto de la aranĝo, Inga-Lill Tyrefelt, tiun ĉi jaron havis siajn unuajn kontaktojn kun la internacia lingvo kaj trovis ĝin taŭga rimedo por homoj kiuj laboras por paco en pli bona mondo.

La sekvo estis ke esperanto-seminario, informado kaj ekspozicio pri Esperanto estis envolvitaj en la du konferenctagojn. Inga Johansson el Göteborg kun helpo de Anna Maria Lange el Lund prizorgis la seminariajn horojn, kaj Kerstin Rohdin kaj Harold Brown el Örebro havis informan prezentadon pri Esperanto. La fakto ke Harold Brown estas anglo sed tamen favoras la internacian lingvon vokis specialan intereson inter la pli ol cento da partoprenantoj.

Abunda kaj varia estis la programo. Åsa Sahlqvist, ankaŭ konata inter esperantistoj, kun bonhumoro, ĉarmo kaj lerteco gvidis seminarion pri ”potenco de la lingvo”. 12 asocioj establitaj kontraŭ atombomboj estis reprezentitaj, kaj iliaj strebadoj estis prezentitaj. Oni ankaŭ aŭskultis prelegojn pri mondfederalismo, Greenpeace, infanaj vilaĝoj kaj multaj aliaj aferoj en kunteksto de la esperoj pri pli bona mondo. Sudamerika dancgrupo ”Los Copehues” riĉigis la programon.

En la prelego pri la infanaj vilaĝoj estis menciite ke la infanoj bo-

Peking, Kina

blir platen por 1986 års stora internationella Esperanto-världskongress.

Det blir en intressant, lockande och helt annorlunda kongress. Intresset för Esperanto står nu på höjdpunkten i Kina, och Du gör naturligtvis vad Du kan för att vara med.

Redan i år bör Du anmäla Dig. Avgiften höjes som vanligt den 1 januari. I början av 1986 kommer information ang. anmälningar för logi, utfärder, bankett etc. Även kostn. i sv. kr.

Vi meddelar här nedan kongressavgifterna, som gäller till slutet av innevarande år 1985. Märk: Direkt medlem i UEA är kongressdeltagare, som i år – 1985 – erlagt avgift till UEA för årsbok och ev. även Revuo Esperanto.

Kongressavgifter (i svenska kronor)

Kategori:	Till 31/12 1985
1. Icke direkt medlem i UEA	518:–
2. Direkt medlem i UEA	416:–
3. Kunulo/junulo/handikapulo – Icke direkt medlem i UEA	310:–
4. Kunulo/junulo/handikapulo – direkt medlem i UEA	208:–

Beställ anmälningsblankett från Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, tel 040-91 63 09 (Om Du ej redan har sådan). Blanketten skall sedan sändas – ifyllt – tillbaka till samma adress.

All betalning sker till postgirokonto 14 74 29 – 5 Esperantoförbundet, specialkonto, Malmö. Anteckna på talongen vad betalningen avser.

Abonu ”El popola ĉinio”!

Nun komenciĝas 1986-a abonvarba kompanjo por El Popola Ĉinio. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1985 10 01 ĝis 1986 02 28) ricevos esperantan kalendaron. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (Guoji shudian), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

Abontarifoj de EPC.

(Ekvalidas de 1-a de Oktobro 1985)

Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Por landoj en Eŭropo:			
£	8.00	13.60	19.00
US\$	10.00	17.00	24.00

La variblon kaj senpagan specimenon ni sendos laŭ peto.

ne komprenis unu la alian. Märtha Andreason tial demandis kian lingvon ili do uzis kaj ekhavis la respondon ke ili signas per manoj kaj piedoj sed tamen sukcesas. Kaj la demandanto kaj multaj

aliaj en la aŭlo de Schiller-gimnazio sentis dubon... Espereble la kontaktoj kun Esperanto donis al la auditorio ekzemplon pri pli bona solvo.

Börje Andersson

Påminnelse

Esperantolitteratur på svenska

Svenska Esperantoförbundet SEF och Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund SEJU har beslutat att utlysa en översättningstävling av verk från esperanto till svenska. Var och en har rätt att delta med obegränsat antal tävlingsbidrag i de olika grenarna:

- Poesi
- Prosa
- Facklitteratur
- Sång

Tävlingsbidragen kan vara hur långa eller korta som helst. De skall insändas i två exemplar och åtföljas av grundtexten på esperanto. Om den översatta texten är mer än 20 sidor lång räcker det att de första 20 sidorna av grundtexten och översättningen sänds

in. Varje tävlingsbidrag skall märkas med en pseudonym. Samma pseudonym skall skrivas på ett bifogat kuvert, i vilket uppgift om översättarens namn och adress finns. Även tidigare publicerade översättningar kan delta i tävlingen.

Tävlingsbidragen skall sändas in till:

EsperantoCentro

Brunnsgatan 21

111 38 STOCKHOLM

senast den 1 februari 1986.

Många värdefulla bokpriser kommer att utdelas till de bästa bidragen. Dessutom kommer vi att göra vårt bästa för att publicera översättningarna. Lycka till!

Librofoiro

BIBLIOTEK '85

Por la unua fojo okazis librofoiro ĉi jare en Svedio. Ĝi estis aranĝita en Göteborg la 22an ĝis 24a de aŭgusto, kaj nepublika.

La kelkmil vizitantoj estis ĉefe bibliotekistoj kaj instruistoj pri literaturo.

Jen, ideala okazo por nia malgranda Eldona Societo prezenti sin en "ĝusta" ĉirkaŭaĵo. Nia malgranda budo estis bone lokigita, ĉe enirejo kaj ĝuste en la fino de strateto, do, bone videbla. Eĉ pli videblaj ni estis en la foira katalogo. Unue kaptis la okulo duonpaĝan anoncon fine de la enhavo-priskribo. En la prezento de partoprenantoj oni listigis ankaŭ la eldonejojn de kiuj ni prezentis librojn. Do, esperanto estas ofta vorto en tiu katalogo. Helpis nin ankaŭ dana librovendejo kun budo 50 m for, ĉar en ilia listo de fremdlingvaj libroj aperis esperantó.

Al bona rezulto multe helpis membroj en Göteborg.

Anita Lindblom

Reciproka helpo

La Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato fondiĝis en 1982, kiel institucio de la Kongreso de la Popoloj. Ĝi havas membrojn kaj kunlaborantojn jam en 15 landoj.

Surbaze de reciproka kooperativa helpo kaj de tutmondismo, la Fonduso unuavice luktas kontraŭ la malsato kaj subtenas konkretajn projektojn, ekzemple en Meksikio, Bolivio, Ĉadio, Senegalio kaj Ruando.

Oficiala lingvo de la Fonduso estas Esperanto, kies uzado ligiĝas kun la lukto kontraŭ la mize-ro, la misnutrado kaj la malsato. Pro tio, aperas esperantlingva eldono de la informilo "Mondo Solidareco" - "Les Nids", F 49190 Saint Aubin de Lulgne (Francio) - Jarabono 12 FF.

Tri Esperanto-stratoj

Dum la 45-a Hispana Kongreso de Esperanto (Kartageno, 5-9.VII) en la sama tago oni inaŭguris tri stratojn en Kartageno, Torre Pacheco kaj La Unión, kun la nomo "Calle del Idioma Esperanto".

"SENNACIULO"

- ĉu vi konas ĝin?

Monata organo de SAT.

- Laborista esperantismo
- Kontraŭ rasismo
- kontraŭ Faŝismo
- Por la homaj rajtoj
- Eŝo de sociaj luktoj
- Donas la parolon al ĉiuj laboristaj tendecoj..
- Abonprezo jare 125:-kr

Ĉe Ivar Paulsson,
Skytteholmsvägen 29 I,
171 44 Solna.
poŝt-konto 26 63 22-7

Traduku por la gazetaro!

Ne nur per direkta propagando oni povas montri la taŭgecon de esperanto. Ofta aliaj metodoj estas pli efikaj.

Gustav Stenholm en Skara, membro de la Esperanto-klubo en Skövde, tradukas artikolojn el Popola Ĉinio, Monato, La Espero kaj aliaj Esperanto-gazetoj kaj publikigas ilin en Skövde Nyheter. Tiamaniere la legantoj de tiu loka gazeto ekhavis artikolojn pri interesaj temoj en Ĉinio kaj aliaj foraj landoj, kiujn la internaciaj presagentejoj ne povis doni.

En la artikoloj estas ĉiam menciite ke estas traduko el la internacia lingvo esperanto kaj el kiu gazeto aŭ ĵurnalo. La artikoloj vekis sufiĉe grandan intereson en la legantaro.

Estas rekomendinde ke esperantistoj en aliaj partoj de Svedio agas sammaniere kun siaj lokaj gazetoj. "El Popola Ĉinio" eĉ petas pri represo de siaj artikoloj, kaj "Monato" nur postulas indikon pri la fonto. Sed kompreneble la tradukoj devas esti en bona sveda lingvo.

Bokklubben Nova Libro

Extraerbjudande:

Anmäl dig som medlem före den 31 dec 1985 så får du ett paketerbjudande på nya kinesiska böcker. Kina är aktuellt som värdland för 1986 års esperantokongress!

Aktuell bok i bokklubben:

Montara vilaĝo
av den kinesiske författaren Chun-Chan Yeh
Pris 61,- kr

Som medlem i bokklubben får du varje år 3-5 utvalda nya böcker på esperanto. Det är framför allt lättlästa böcker, noveller eller korta romaner.

Du har 10 dagar på dig att bestämma dig för att behålla boken eller returnera den.

Anmäl dig:

Skriv ett brev eller vykort till adressen nedan, eller direkt till bokklubbens arbetsadress Tyresö Esperantoförening, U Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö. Tala om ditt namn, adress, telefon och underteckna.

Bokklubben Nova Libro

Esperantoförlaget, Brunnsgr. 21, 111 38 Stockholm

DANKON



Koran dankon pro viaj
bonvenaj donacoj

Klubo Cent

Ruben Enocson, Solna
Börje Andersson, Skövde
Ragnar Hjort, Stockholm
entute kr 300:—

Klubo 100 jaroj

Karin Lindquist, Arboga
entute kr 100

Donacoj

Henry Almer, Trollhättan
Anita Lindblom, Stockholm
Lennart Nordebo, Kalix
Lunds Esperantoklubb
Esperantoklubben Montlagópo,
Kiruna
entute 2.285

Je memoro de Ester André

Lisbet Andreasson
entute kr 2.000

Esperanto kaj turismo

En numero 7 1985 de "La Espero" mi skribis pri la "simpozio pri Esperanto kaj Turismo", okazinta en Pisanica kaj Sofio 11-17 de sept. Tiam mi menciis, ke mi ne sciis la rezulton de la kontaktoj kun MTO – La Monda Turisma Organizaĵo.

Nun venis la oficiala raporto de la organizantoj al i.a. Landaj Asocioj. Ĝi tekstas jene:

"En la Internacia Esperanto-Kursejo – Pisanica, Bulgario okazis Internacia Simpozio pri "La lingvaj obstakloj al la libera evoluo de turismo" (11-17.IX. 1985). Ĝia ĉefa celo estis fari kontaktojn kun la Ĝenerala Asembleo de la Monda Turisma Organizaĵo (MTO) kaj laŭeble sugesti al ĝia Sesia Sesio pri la eblecoj de la Internacia Lingvo en la solvo de turismaj lingvaj problemoj.

Sed kroma celo de la simpozio estiĝis la kunordigo de la diversaj aranĝoj, iniciatoj, klopodoj kaj instancoj vaste en la E-mondo. Venis reprezentantoj el 11 landaj, turismaj naciaj komitatoj kaj organizaĵoj, Pola Radio.

La simpozio preparis vere bonan grundon por estonta influo de UEA kaj ĝiaj LA al MTO kaj la internacia turismo. Okazis viglaj kontaktoj kaj informoj ĉe la ambasadejoj en Sofio de Greklando, Belgio, Nederlando kun registaraj altrangujoj el ministerioj en Pollando, Greklando, Bulgario kaj Hungario! UEA eldonis specialan broŝuron en E. kaj angla pri la lingva problemoj en la turismo kaj kontribuis grave por la organizado kaj realigo de la simpozio per la du estraranoj: la prezidanto s-ro G. Maertens kaj inĝ. P. Todorov.

La simpozio ellaboris tri dokumentojn:

1. Projekto-rezolucio:
2. Alvoko al la esperantistaro:
3. Telegramo al la Ĝenerala Sekretario de MTO".

Malgraŭ la rezulto fariĝis iom misa pro kiel oni skribas – tedaj kaj neatenditaj eraroj – ni en la esperanto-organizaĵoj devas pli pripensi la gravecon havi kontaktojn kun la turismaj agentejoj kaj oficejoj.

Legu denove la alvokon al ĉiuj Landaj Esperanto-Asocioj kaj aliaj Esperantoorganizaĵoj de la simpozio. Ĝi estis publikata en no 7 de "La Espero".

Ĉu ni fondu specialan komisionon aŭ sekcion por "Esperanto kaj Turismo" ne nur en landa sed eble ankaŭ en regiona nivelo? Kion vi opinias en la kluboj?

Märtha Andreasson



Kultura Esperantofestivalo

— lägesrapport

Ingen har väl glömt Esperantokulturfestivalen i Uppsala pingsten 1986, som vi skrev om i La Espero nr 2/85. I det tysta har förberedelsearbetet pågått hela sommaren och hösten. Annonser har publicerats i de större Esperantotidningarna, artister har forskats fram och kontaktats, en slagkraftig affisch har tryckts upp. Men vi har också fått känna av en hel del tärande väntan och osäkerhet: Ska artisterna svara? Ska vi kunna erbjuda dem tillräckligt goda villkor? Ska vi överhuvudtaget få några ekonomiska bidrag? Hur ska någonting kunna planeras när allt hänger i luften och beror på vartannat?

Så småningom har vi fått in svar från flera intressanta artister och har alltså underlag för ett fint internationellt program med musik och teater på Esperanto. Men fortfarande har det största bekymret återstått — pengar.

Först för några veckor sedan fick vi glädjebudet att vi beviljats en del av de statliga medel vi ansökt om. Det rör sig inte om särskilt mycket pengar — sammanlagt 7 000 kr. Men detta garanterar i alla fall att festivalen överhuvudtaget blir av.

Ändock: detta är bara ett minimum. Ju vidare ramar vi har, desto bättre blir festivalen. Detta är viktigt, inte minst med tanke på informationsvärdet utåt. (KEF kommer att stå upptaget bland andra arrangemang i Uppsala officiella evenemangskalender för

jubileumsåret.) Att detta inses av klubbar och enskilda medlemmar i SEF litrar vi på — det såg vi på det positiva intresse som visades oss då vi informerade om KEF under årskongressen i Helsingborg. Nu återstår konkreta handlingar.

Stockholmsklubben har redan lovat bekosta en artist. Uppsalaklubben har skänkt pengar, och det har även Norrköpingsklubben lovat göra. La Ranetoj har från första början lagt ut avsevärda summor. Vi hoppas andra följer dessa goda exempel! Ekonomisk hjälp tar vi tacksamt emot på vårt postgirokonto 488 88 54-9, Kultura Esperanto-Festivalo. Men även praktisk hjälp är mer än välkommen, exempelvis med transport av artister och tillresande esperantister till Uppsala. Skriv till KEF under Esperanto-Centros adress!

Per Aarne Fritzon

**Vi behöver ditt stöd!
Ni bezonas vian
subtenon!**

**Kultura Esperanto-
Festivalo
Brunnsgatan 21,
111 38 Stockholm
Postgiro/Poŝtgirokonto:
488 88 54-9**



Artiklar behövs

Kontakto heter en tidskrift som kommer ut sex gånger om året. I den publiceras artiklar om olika teman. Hälften av dem är skrivna så att nybörjare skall kunna läsa dem utan svårigheter.

Kontakto behöver ständigt nya medarbetare. Vi tar gärna emot alla slags artiklar, utom sådana som innehåller direkt politisk eller religiös propaganda, sådana som handlar om esperanto eller esperantorörelsen och -kulturen samt direkt skönlitterära alster som noveller och dikter. Däremot är alla andra slags artiklar välkomna, t ex reseberättelser, populärvetenskapliga artiklar och mycket annat. Under 1986 kommer temanummer att publiceras bl a om följande teman: "Kina", "Återuppväckande av språk och folk-kulturer", "Döden", "Konst och litteratur". Kan du tänka dig att skriva om något av dessa teman eller om något annat, sänd då ditt bidrag till:

**Leif Gunnar Nordenstorm
Studentvägen 22:19
752 34 UPPSALA.**

Vill du prenumerera på Kontakto? Betala 60 kronor till postgiro 2012-3, Esperantoförbundet.



IJK en Israelo

La Internacia Junulara Kongreso en 1986 okazos en ĉarma junulara vilaĝo apud Netanja 14-21 aŭgusto 1986. Pli da informoj sekvos.



Nordiska folkhögskolan i Kungälv
Svenska Esperantoförbundet
 — Västra regionen
Kungälv's Esperantoklubb
 inbjuder till
Internationell kurs
i esperanto

Plats Nordiska Folkhögskolan i Kungälv
Tid 12-16 maj 1986

Det blir nybörjarkurs, fortsättningskurs och en kurs för esperantolärare. Omfattar ca 30 studietimmar.

På förmiddagarna blir det vanliga lektioner och på eftermiddagarna föredrag och diskussioner, som samtidigt är tolkningsövningar.

Dessutom ordnas studiebesök, någon utflykt och olika kvällsprogram.

KOSTNAD 250 kr per dag. Då är kost och logi (i enkel- eller dubbelrum), kursavgift och kursmaterial inräknat.

Om du inte bor på skolan blir avgiften givetvis betydligt lägre. Möjligheter till bidrag och stipendier finns också.

Kursen anordnas i samarbete också med INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO I PISANICA, BULGARIEN

Mer upplysningar:

Märtha Andreasson, 031-57 11 33, Solveig Ek, 0303-159 02 eller Marianne Nilsson, 0303-467 38.

La 41:a Dan-sveda esperantotago okazis la 1:an de septembro en la nordokcidenta parto de Skanio. La partoprenantoj kolektiĝis en Helsingborg kaj post vizito en la Lugnaro-tombo kaj lunĉo en Hemmeslöv sekvis rondveturo sur la duoninsulo de Bjäre. La tago finiĝis per amuza kunestado en la popolkultura parko de Ängelholm. Anita Nowakowska kaj Ewa Mackowska en Pollando prezentis varian kaj tre ĉarman programon kun muziko kaj kantado.

Ili ankaŭ faris rondveturon en la suda distrikto kie ili vizitis klubojn kaj lernejojn en Hörby, Landskrona kaj Malmö.

Suda Distrikto aranĝis semajnfinan kurson en Jämshög la 12-13-a de oktobro. 34 personoj partoprenis kaj la studentoj estis dividitaj en tri grupoj.

Dum la tago de la biblioteko la 13-an de oktobro Ann-Christine Krondahl informis en Kristianstad pri Esperanto kaj montris librojn esperantajn.

Lisbeth Andreasson

Klipp ur SLA 19851003:

Esperanto klubben fick svar

Vid Falköpings Esperantoklubbs månadmöte kunde rapporteras att det kommit svar från statsminister Olof Palme på ett brev från Yokohama Esperanto-Rondo, som klubben översatt och sänt till honom.

Det var en deklARATION från Kangaua-distriktet: "Mot kärnvapen". I sammandrag uttryckte japanska folket, som varande det enda som utsatts för kärnvapenbomber, önskan om en evig fred. Hur dagens kapprustning hotar hela mänskligheten. Och slutar med tre principer, som antagits av japanska regeringen: "Inte äga, fabricera eller låta placera kärnvapen i landet". Och menar att det borde vara alla folks önskan att uppfylla dessa krav.

Olof Palmes svar:

Tack för Ert brev av den 12 juli med en deklARATION från Yokohamas Esperantoförening.

Sverige kommer aldrig att vare sig äga, tillverka eller tillåta införandet av kärnvapen i vårt land.

Era japanska kollegors deklARATION ger uttryck för åsikter och krav som delas av människor världen över. Det är alla folks uppgift att verka för avskaffandet av kärnvapen och förverkligandet av fred jorden över. Ingen politisk uppgift är i dag viktigare än denna kamp — för att skydda vår värld åt våra efterkommande.

Med vänliga hälsningar
 Olof Palme

Okcidenta regiono

Raporto

Estas kursoj en ĉiuj kluboj de la regiono. En Falköping oni daŭrigas la lokajn radioelsendojn kaj ofte havas artikolojn en la loka gazeto.

Borås havas kurson kaj krome informas diversmaniere. Göteborg: Kaj Esp. societo kaj Interservo havas kursojn, estis ekspozicio en la Informcentro de Gotenburgo dum 2 semajnoj en septembro. Informbroŝuroj pri kursoj estas distribuitaj al ĉiuj bibliotekoj en Gotenburgo kaj najbaraj lokoj. Ankaŭ samtempe estas



proponata la koresponda kurso de IN.

En Kungälv estas du kursoj kaj en Nödinge unu, kiun mem stariĝis ABF en Kungälv. La Klubo partoprenis ekspozicion en Stenungsund, kie ekestis intereso de la Popola Altlernejo de Tjörn aranĝi kursojn por esperantoinstruistoj. En majo venontjare estas aranĝata semajna kurso en kunlaboro de Nordia Popola Altlernejo kaj Internacia Esperantokursejo en Pisanica, Bulgario. La klubo aranĝis vojaĝon al Pisanica kie kurso estis grava parto de la programo. 8 klubanoj partoprenis Interŝanĝe venos bulgario al la kurso en Kungälv ventontjare.

Skövde aranĝis kursojn kaj ankaŭ ekskursojn kaj informadon diversmaniere i a konekse kun loterio.

Falköping, Göteborg kaj Skövde havis vizition de la polinoj Anita Nowakowska kaj Ewa Mackowska kaj la angla advokato Frank Buckley.

En novembro estos kurso en Halmstad en informado por la tuta regiono.

Märtha Andréasson

Nordokcidenta regiono

Esperanto på Bengtsgården

Bengtsgårdens Hem- och Skolförening har haft årsmöte och till detta hade de inbjudit Ingemar Nordin, som på sitt vanliga engagerade sätt informerade om esperanto. Vid diskussionen efteråt visade sig att man var intresserad av att starta en nybörjarkurs i esperanto för föräldrar och lärare.

I tidningen Dalslänningen var den 8 oktober en lång artikel om sammankomsten.

Vi saxar följande:
"Hur kom det sig då att Bengts-

fors blev en av de första orterna i landet att erbjuda esperanto som tillvalsämne? Jo, i våras närmare bestämt i mars – hade Bengtsgården en temadag under rubriken "Internationell solidaritet". 24 elever i dåvarande årskurs 7 fick då en dag information om esperanto av en lärare på skolan. Drygt hälften av dessa ville lära sig esperanto. Detta uppmärksammades så småningom av skolstyrelsen som strax före midsommar beslutade att införa esperanto från och med läsåret 1986–87. I september gav så länskolnämnden sitt godkännande av den föreslagna kursplanen.

Samtliga klasser i årskurs 6 har nyligen fått en timmes information om det nya tillvalsämnet, och nu var det alltså föräldrarnas och högstadielärarnas tur att bli informerade.

B.S.

Tedu regiono

Inför hösten 1985

När du läser det här har höstarbetet redan kommit igång på de flesta håll. De flesta klubbarna i TEDU-regionen, och även på andra håll i landet har haft besök av höstens "föreläsare". Frank Buckley, advokat från Bristol i England, har berättat om sina fem intressen under sina 50 år som esperantist. Anita och Ewa från Polen gjorde en bejublad kulturturné genom landet. På många ställen har klubbarna ordnat samarbete med andra föreningar och haft gemensamma program. I Västerås t ex hade man ordnat programmet tillsammans med polska föreningen och man hade samlat ett sjuttioal deltagare i bibliotekets hörsal. På flera håll har man ordnat program i skolorna med både flickorna och Frank Buckley, som i Motala höll lektion på engelska. Från Östansjö hördes kommentaren "Så bra program ni alltid ordnar från Es-

peranto-håll". Då har vi kommit en bit på väg i vårt arbete!

Till våren kommer Hugo Röllinger från Västtyskland för att turnera i Sverige. Han kommer att berätta om Andrés färd till Nordpolen eller om Island. Hopplas att även hans turné kommer att ge liknande eko.

Den 31 september var det Barnkulturfestival i Örebro. Man hade omväxlande program hela dagen från kl 10 till 17. Ett utav inslagen stod Anita och Ewa för. De sjöng alltså offentligt på torget och konferencieren nämnde flera gånger att de var esperantister från Polen, som turnerade i Sverige.

1983 besökte manskören Lorelei från Örebro Torun i Polen och framträdde på flera ställen med sångprogram. Den 21/9 1985 ägde återbesöket från Polen rum. Det var en sång- och dansgrupp som gästade Örebro. Sångkören Lorelei höll i arrangemanget och samarbetade också med kommunen och landstinget, som ställde upp både ekonomiskt och in natura. Ett bra steg framåt när andra arbetar så för esperanto!

Kerstin Rohdin

Fuĝinto de la Angla lingvo

Lastatempa alveninto en Svedion estas Harold Brown kiu post profesia kariero en Britio, kie li laboris en la Central office of Information, ĵus translokiĝis al Örebro de Londono. Dum kelkaj jaroj li estis membro de la Konsilantaro de la Londona Esperanto-Klubo kie li aktivigis kaj pri la ĉiutaga vivo de la Klubo kaj pri apartaj projektoj, kiel lerneja projekto kiun la Londona Klubo entreprenas komisie de UEA por la Jubilea Jaro. Li venis al Svedio por agi pri Esperanto en lando alia ol la denaska.

"Mi fuĝis de la angla lingvo" li diris ŝerce. "Mi bone konas la esperantan movadon en Britio. Nun mi volas lerni pri Esperanto en alia lando kie la angla lingvo ne



estas la unua lingvo. (Post miaj komencaj luktoj kun la sveda lingvo dum du monatoj mi jam pli bone komprenas kia bona solvo estas Esperanto!) La scipovo de svedoj pri la angla certe estas imponiga (ofte, kiel eksterlandano, mi estas danka al ĝi) sed la angla ne estos fina solvo de la internacia lingva problemo. Ĝi ĉiam havos rolon internacie sed ĝi neniam estos universale akceptita kiel ĉies dua lingvo; ĝi estas malfacile lernebla kaj ĝi ne estas neŭtrala — ĝi ĉiam ligiĝas kun la angla kaj la usona kulturoj kaj historioj. Esperanto sukcese evitas tiujn malhelpojn. Estas grave tamen ne rigardi Esperanton kaj la anglan kiel konkurantoj unu kontraŭ la alia. Ambaŭ havos lokon en la mondo — la angla, ĉar, ĝi estas jam parolata de unu dekonono de la mondo, kaj Esperanto, pro tio ke, kontraste kun ĉiu alia lingvo, ĝi estas ellaborita precize por solvi la internacian lingvan problemon.


Esperanto kiel "libera aktiveco"

En Västerledsskolan en Enköping 24 entuziasmaj gejunuloj (13-14 jaraj) nun lernas esperanton en la kadro de "libera aktiveco". Ili renkontiĝas unufoje semajne por du lecionoj. La unua periodo finiĝos post 8 semajnoj, sed la plejmulto jam decidis daŭrigi dum la dua periodo, do ĝis kristnasko.

La grupo volonte akceptos salutojn per poŝtkartoj k t p sub la jenaj adresoj:

**Fri aktivitet
Esperanto-grupo
Västerledsskolan
199 62 Enköping**

Sven Jonsson
kursgvidanto



La gelernantoj en "libera aktiveco" kun sia instruisto Sven Jonsson.

Nekrologo

Carl Holmström, Ljungby, 1910–1985, forpasis la 6-an de novembro. Li estis esperantisto jam de la juneco sed sia plej aktiva tempo kiel esperantisto li pasigis en la esperantoklubo de Ljungby, kie li depost la fondo en 1973 estis kasisto. Li ankaŭ instruis infanojn en la lernejo. Li estis tre energia kaj la klubo tre funebras lin kaj kondolencas lian edzinon Walborg kaj la infanojn.

Kiu povas helpi la germanan "VISIR"?

La germana VISIR deziras esperanto-tradukitan materialon de sveda VISIR. Se iu povas helpi ilin anoncu vin al Esperanto Centro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm.

Alvoko por AIMAV-kolokvo 1987

En aprilo-majo 1987, AIMAV (Internacia Asocio por la Esploro kaj Disvastigo de Aŭdovidaj kaj Struktur-sumaj metodoj) organizos ĉe la Universitato en Gento (Belgio) plurtagan internacian kolokvon nacilingvan pri la problemaro rilate al la disvastigo kaj la pedagogio de tiel nomataj "internaciaj lingvoj".

La titolo proponita estas: La valoro de universala 'lingua franca', natura aŭ planita.

Ĝi estos pitraktata el kvar vidpunktoj: komunika, psikologia, pedagogia kaj soci-kultura.

La fincelo estas interesigi, neesperantistajn esploristojn, instruistojn kaj profesorojn, oficialajn lingvo-respondeculojn de internaciaj organizaĵoj pri Esperanto. Tamen, por altiri tiujn homojn, estas necese plilarĝigi la temaron, kaj ne limigi ĝin al Esperanto.

Estos okazo funde analizi la lingvan situacion en la Europa Komunumo, la Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, pritrakti la specifan staton de la angla lingvo en la mondo, kritike me konsideri ĉiujn jam proponitajn solvojn kaj rimedojn kaj precipe prezenti altnivele Esperanton en ĉiuj ĝiaj aspektoj.

La uzotaj lingvoj estos la franca, la nederlanda, la angla kaj Esperanto. Ĉiuj referaĵoj aperos poste en libro, eldonata de AIMAV en unu el ĝiaj sciencaj serioj.

Ni nun serĉas kunlaborantojn, kiuj konsentas fari kelkajn esploraŭ kompillaborojn aŭ prezenti referaĵojn. La oficiala AIMAV-cirkulero aperos en februaro-marto 1986 kaj estos tre larĝe disvastigata.

Kontaktadreso por la esperantistoj: **Edward Symoens, Putsestenweg 131/A, B-2180 Kalmthout.**

Novaj fakaj asocioj

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

En aŭgusto fondiĝis Internacia Komerca kaj Ekonomia fakgrupo (IKEF). La nova fako kunordigos aperigon de artikoloj pri la ekonomia situacio en apartaj landoj. Krome, ĝi starigos Perad-servon por ebligi kontaktojn inter tiuj, kiuj proponas kaj tiuj, kiuj serĉas varojn de ĉiu speco.

Informoj ĉe: **Mondkomerca Eldonejo Esperantista, PK Kesto 25041, NL-3001 HA Rotterdam.**

Tutmonda Esperanta Bibliotekisto Asocio

Tutmonda Esperanta Bibliotekisto Asocio (TEBA) celas interligi ne nur la esperanto-lingvajn bibliotekistojn, sed ankaŭ la privatajn libro-kolektantojn. Kontaktadreso: **Geoffrey King, 228 Capworth Street, London E 10 7HL, Britio.**

Filozofia Asocio Tutmonda

Filozofia Asocio tutmonda (FAT) kun la fakrevuo Simpozio.

Prezidanto: **Eugène de Zilah, 39 rue Joseph Hénot, F 57070 Metz, Francio**

Ĉiulandaj pacpropagandiloj serĉataj

Samarkanda Esperanto-klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn plakatojn, flugfoliojn, fotojn, (infan) desegnaĵojn, librojn, revuojn, ĵurnalojn, lum-bildojn, insignojn, gluafiŝetojn, poŝtmarkojn, ĉiujn ceterajn pac-propagandilojn. La materialoj

INDIVIDUA MEMBRECO EN UEA KONTRAŬ 6:50 GULDENOJ!

Tra la pasintaj jardekoj, pro diversaj transpagaj kaj pagaj problemoj, la individua membreco en UEA iom post iom fariĝis privilegio de esperantistoj en la ekonomie bonstataj landoj. Dum la 70a UK de Esperanto, en Aŭgsburgo ĉijare, la Komitato de UEA faris decidon, kiu atendeble povus montriĝi historia paŝo rilate la geografian distribuitecon de la individua membraro de UEA.

Temas pri la decido enkonduki ekde la jaro 1986, eksperimente por la venontaj tri jaroj, tute novan kategorion de la individua membreco - MEMBRO KUN GVIDLIBRO tra la Esperanto-movado. La kotizoj en tiu kategorio estas tiel malaltaj, ke nun eblas aparteni al la individua membraro de UEA kontraŭ 6,50 guldenoj jare, se oni loĝas en evolulando aŭ en lando kun gravaj transpagaj problemoj. Kompreneble, kiel la ceteraj membrokotizoj de UEA, ankaŭ la pago por membri en la nova kategorio varias de lando al lando, depende de la vivnivelo.

Krom la membrokarto, kiu rajtigas ilin al la utiligo de la diversaj servoj de UEA, la novaj membroj ricevos ĉ. 100-paĝan depresaĵon de la Jarlibro, kiu enhavos amason da adresoj kaj aliaj utilaj informoj ne nur pri UEA sed ankaŭ pri la landaj kaj fakaj asocioj kaj diversaj aliaj movadaj instancoj.

Cio ĉi signifas, ke la membreco en UEA ne plu estas demando de mono sed nur de bonvolo.
BONVENON EN UEA.

estas serĉataj por la jam tradiciaj internaciaj porpacaj ekspozicioj.

Bonvolu, adresi ĉion al:

**INTERKLUBO "ESPERANTO"
SU-703000, SAMARKANDO
GLAVPOČTAMT, abon.ja. 76
UZBEKISTANO, USSR**

rajn programojn. La teatra grupo el Lodz prezentis "Diablo", - bonaj artistoj en belaj kostumoj.

Urzula Tupajka inter alie legis poemojn de Julio Baghy tre elegante miksite kun fortepiano.

La du ĉefaj punktoj estas sendube la internacia vespero kiam ĉiu lando kontribuis per programeto kaj la maskobalo, kiu estis vere gaja festo. Dank al bona gvidado de Urzula Tupajka, la feriado estis tre sukcesa.

Karl-Erik Peterson

Ora pola aŭtuno

Ora pola aŭtuno okazis 2-15a de septembro kiel kutime en Miedzygorsce, la bela montara regiono.

520 partoprenantoj ĝuis la bonan klimaton kaj multajn kultu-